
# Vertikale

Trimonata
periodaĵo
por la aktivuloj
de FEL

aprilo-junio 1994



**Nova prezidanto, nova sono?**

## Flandra Esperanto-Ligo

### Estraro

*Prezidanto:* Wim De Smet
*Vicprezidanto:* Alex Humet
*Membroj:*
Roland Rotsaert
Jacques Schram
Ingrid Lievens
Johan Van Eeno

### Komisiitoj:

*Financoj:*
Roland Rotsaert
Paul Peeraerts
Gerd Jacques
*Eldona agado:*
William Auld
Gerrit Berveling
Chris Declerck
Rejna de Jong
Alex Humet
Paul Peeraerts
*Instruado:* Raymond Wylleman
*Dokumentado:* Marc Vanden Bempt
*Rebata servo:* Germain Pirlot

### Oficejo

La oficejo de FEL troviĝas en Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Ĝi estas malferma por la publiko ĉiun labortagon inter la 9a kaj 12a30 kaj inter la 13a30 kaj 17a30. Vizitantoj bonvolu tamen anticipe interkonsenti pri rendevuo.
Telefono (9-12.30 -- 13.30-17.30h) (03) 234 34 00 - telekopiilo (tagnokte): (03) 233 54 33.

La adresoj de la supraj personoj estas troveblaj en la adresaro malantaŭe en Vertikale. Tie vi ankaŭ trovos la adresojn al kiuj referencas la asteriskoj post kelkies nomo en artikoloj.

**Enkonduko (jdm)**

Ĉi tiu numero enhavas la novan organigramon. En ĝi aperas sufiĉe da novaj nomoj, kio min tre plezurigas. Mi deziras al ĉiuj fruktodonan agadon kaj multan daŭrigemon. Certe do nun troveblas iu kiu disponas pri pli da tempo ol mi kaj pretas transpreni la redaktadon de Vertikale. Antaŭ unu jaro mi engaĝis min al Vertikale por ke ekfluu denove la ĉesinta informfluo ene de FEL. De tiam almenaŭ ĝi ekfunkciis denove, sed certe ne abunde. Mi kredas ke necesas mobilizi kandidaton kiu povas pli sin koncentri sur Vertikale, nun necesas agadi por Fleja, dum mi estas membro.
Bonan legadon kaj esperantumadon.

**Uzado**

**Letero de leganto (fr)**

En Vertikale mi legis ke la centro bedaŭras preskaŭ neniam ricevi informojn pri la ĝusta agado de la grupoj. Kaj speciale pri la manieroj laŭ kiuj ili plenigas la grupkunvenojn. Tial ĉi tiu letero, kiu volas informi vin pri la Bruĝa grupa "Paco kaj Justeco".
Ni kunvenas ĉiun duan kaj kvaran ĵaŭdon de la monato, je la 20a h. La kunveno komenciĝas per "Historia kvaronhoro". Tiam mi parolas pri iu specialaĵo aŭ speciala okazintaĵo en la historio. Ekzemploj: mi jam pritraktis la unuan leĝaron en la historio, tiu de reĝo Hamurabi en Babilonujo. Mi legis leteron de Laŭrenco Il Magnifico kiun li sendis al sia filo, kardinalo en la aĝo de 17 jaroj, kaj estonta papo Leo X. Mi voĉlegis ĉapitron el "Il Principe" de Nikolo Machiavelli (kun komentario) ktp, ktp. Tio anstataŭas la antaŭajn paroladojn pri iu historia temo.
Dua punkto de la tagordo. S-ro Maertens jam venigis plurajn konatajn esperantistojn por prelegi. Se ni ne havas gaston,



ni priparolas iun artikolon el la revuo Esperanto aŭ iun gravan okazintaĵon en la movado (ekzemple: la vidpunkto de Umberto Eco rilate al Esperanto).
Kelkfoje ni tradukas malfacilajn nederlandlingvajn vortojn aŭ esprimojn aŭ proverbojn. Aŭ ni tradukas famajn dirojn de same famaj filozofoj, historiistoj, beletristoj ktp. Nia estinta sekretario, R. Iserentant jam ofte prizorgis krucvortenigmojn. Ĉio en Esperanto, kompreneble.
De tempo al tempo ni okazigas debatojn, kiujn ni nomas "ideo-interŝanĝoj". Temoj estas ekz. arto, literaturo k.a. Foje ni petis la membrojn voĉlegi du de siaj preferataj poemoj. Poste la ĉeestantoj juĝis pri ili. Ni ankaŭ okupiĝis pri la konkurso de la pola radio. Do ni havas sufiĉe da temoj por plenigi niajn kunvenojn.
Esperante ke tiuj informoj utilas al vi, mi salutas samideane, Fernand Roose *.

**Ndlr.**: Fakte tute ne estis la centro kiu diris ŝati pli da reagoj, estis la redaktoro de Vertikale kiu el la vidpunkto de FEL petis tion. Tiu redaktoro tute ne estas dungito de la GCA.

**Informado**

**Tri sciigoj (gp)**

Kiam artikolo, favora aŭ ne al Eo, estas publikigita en la gazetaro, endas diskonigi ĝin **senprokraste** kaj al aktivuloj, kaj al la rebatservo.
Tio valoras ankaŭ por artikoloj kiuj pritraktas la lingvan problemon je eŭropa nivelo.
SED, nepras mencii **TRI** sciigojn, kiuj nepras, ĉu por arkivigi tiun artikolon, ĉu por reagi (danki, rebati, pliinformi). Temas pri:

- la **titolo** klare skribita
- la **dato**
- la kompleta **adreso**

Temas pri elementa referenco por aktivuloj. Regule atentigu viajn informantojn tiurilate.

D ato
DAT DAT DAT DAT A DRESO
T itolo

**Kion fari por eniri fakmedion? (gp)**

*Konstato*

1. Sen aplikado ankaŭ por fakceloj, Eo neniam amase allogos, ĉar ne estos forta motivigo lerni ĝin.
2. La plimulto el niaj E-fakasocioj estas nur surpaperaĵoj, kies agado estas ofte tre sensignifa.
3. Grava eraro estus daŭre agadi en "verdaj getoj" sen iu ajn kontakto kun neesperantistaj samfakuloj.

*Kion fari?*

1. Daŭrigi la ĝisnunan agadon, sed laŭeble vigligi ĝin.
2. Starigi kontaktojn kun samfakuloj per
   - tradukado de fakartikoloj el Eo por proponi al fakbultenoj, -revuoj
   - tradukado de fakartikoloj el nacilingvoj por proponi al E-fakbultenoj, -revuoj
   - prizorgado de diverscela korespondado inter e-istaj kaj neesperantistaj fakuloj
   - informado al neesperantistaj fakuloj pri fak-seminarioj, -konferencoj, -kongresoj kies laborlingvo estos (ankaŭ) Eo

   Rim.: NENIAM nia celo estu esperantigado de la kontaktitaj homoj, kiuj mem interesiĝos pri Eo se nia kunlaboro estas fruktodona.
3. Instigi E-fakulojn al ĉeesto en internaciaj fak-konferencoj, -seminarioj, -

kongresoj, eĉ se inter la laborlingvoj ne troviĝas Eo

kaj ▪ aktive partopreni en la laboroj, debatoj por pruvi sian fakkompetentecon

▪ neniel propagandi por Eo, sed nur uzi ĝin kun alilingvaj Eistoj dum paŭzoj, en la koridoroj, dum manĝoj, k.s.; ĝenerale tio sufiĉas por veki la intereson, al kiu ni respondu, NE per fanatika propagando, sed per racia, objektiva informado, **sen tedi.**

▪ organizi apartan kunvenon por la E-partoprenantoj (vespere, antaŭ kaj/aŭ post la konferenco) por pritrakti i.a. la uzotan strategion, fari bilancon, pretigi laborplanon, ktp.

Rim.: kunordigu tian agadon estrarano aŭ (loka) komisiito de la rilata E-fakasocio, se ĝi ekzistas

*Konkludo*
En fakmedioj, la FINcelo estu ke Eo fariĝu laborlingvo samrajta kun alia(j) nacilingvo(j).

**Alternativo por Schindler's List (rr)**
Momente en kinejoj ĉie tra la mondo videblas la lasta Spielberg-spektaklo. Eĉ estas amase instigitaj lernejanoj por vidi tiun filmon.
Ekzistas alia filmo, Moi Ivan, Toi Abraham de franc-pola reĝisorino Yolande Zauberman, kiu estas malpli spektakla sed versajne pli valora. Bedaŭrinde, ĉar *Schindler's List* dum monatoj blokos multajn kinejojn, tiu filmo tute ne aŭ nur tra iuj "intelektulaj" retoj estos videbla de la publiko (kaj kompreneble post tri jaroj en televido, ĉirkaŭ meznokto).

Tamen *Moi Ivan, Toi Abraham* ŝajnas ege interesa filmo, precipe por esperantista publiko, ĉar ĝi perfekte skizas la situacion en kiu povis ekesti la internacia lingvo.
Do: se vi havas ŝancon vidi tiun filmon, iru kaj raportu pri ĝi.
(informoj bazitaj sur recenzo en *De Morgen*, 01.01.94)

**Interne**

**Kiom respondecas la membroj kaj la estraranoj de FEL? (rr)**
Kiam en septembro 1993 mi atentigis pri (interalie) la financa situacio de Flandra Esperanto-Ligo, eble iuj maltrankviliĝis pri personaj konsekvencoj. Ĉu pro tio ni nur pene trovis la necesan kvanton da estraranoj ?

Por pli bone kompreni la aferon, ni rigardu la leĝon.

FEL estas *Vereniging zonder winstoogmerk* laŭ la leĝo de 27 junio 1921. Artikolo 14 tekstas:

> *De vereniging is aansprakelijk voor de misgrepen, die kunnen toegeschreven worden, hetzij aan haar aangestelden, hetzij aan de organen, waardoor haar wil wordt uitgevoerd. Door de beheerders wordt geen persoonlijke verplichting aangegaan betreffende de verbintenissen van de vereniging. Hun aansprakelijkheid is beperkt tot de vervulling van hun gegeven opdracht en tot de in hun beheer bedreven misgrepen.*

La asocio devas plenumi diversajn formalaĵojn: publikigoj en la ŝtatgazeto, depono de membrolisto... Laŭ artikolo 26:

> *Ingeval de bekendmaking en de formaliteiten, voorgeschreven (...) werden verzuimd, kan de vereniging zich niet op de rechtspersoonlijkheid beroepen tegenover derden (...)*

Mia konkludo estas ke la personaj financoj de membroj kaj estraranoj ne estas minacataj, krom en kazo de neplumo de la formalaĵoj aŭ de ege gravaj misagoj de respondeculoj. Pli detalaj informoj troveblas en la Manlibro por Esperanto-Aktivuloj.

Cetere, FEL ne estas bankrotanta, sed jes utilas plifortigi la financan bazon (por eviti ĉiujare revenantan problemon de dumtempa manko de disponebla mono) kaj plibonigi la librotenadon (por sufiĉe frue antaŭvidi problemojn).

**APE-laborkunveno - Flémalle-Grande - 2 apr 1994 (rr)**
* G. Sossois prezentas la listojn de la diversaj listoj por la eŭropa balotado. Oni (t.i. diversaj individuaj APE-anoj) skribos modelan leteron (ne menciantan Eon) al la ĉefaj kandidatoj. Se ili reagos, GS send(ig)os respondon en kiu Eo estas menciita.

* Antoine Dumortier * prezentis skizon de nova ESPEUROP-informilo. Nenio estas menciita pri kostoj, distribuo... Dumortier daŭre ne vidas utilon por mem lerni Eon (nur pro li la tuta kunveno okazis en franca lingvo!). Li miras ke li ne plu havas kontakton de respondeculoj de brusela grupo. [Laŭ mia kompreno la brusela grupo evitas havi kontakton kun li - rr]

* Gh. Tilleŭ intencas reeldoni (en franca lingvo, nigreblanke, A5) sian *Zamenhof Bildrakonte*, kun korektoj kaj kelkaj aldonaĵoj. Estas promesitaj subvencioj de valona registaro kaj de APE. Tiuj tamen nur kovras parton de la tutaj kostoj (ĉ. 100.000, depende de la eldonkvanto (1000-2000)). Donacoj aŭ antaŭmendoj estas bonvenaj.

* M. Delforge bedaŭris ke samtempe okazos tago de flandraj Ardenoj kaj trilanda renkontiĝo. Mi menciis la ekziston de la FEL-bultenejo, kiu eble helpos estonte eviti tiajn koincidojn. Ankaŭ utilus ke unu respondeculo de APE grupigu la ĉefajn programerojn kaj komuniku ilin al FEL (aliĝante al la aŭtomatigita kalendaro de *Horizontaal*).

* APE gratulas Wim De Smet kaj esperas konstante kunlabori por Eo.

* M. Delforge invitas la ĉinajn vizitantojn (aŭ almenaŭ la esperantistojn inter ili) je la 26a de junio en La Louvière. Kiu FEL-estrarano respondecas pri ili? Ĉu ID?

* Por libroborso en regiono de Liège je Pentekosto estas serĉataj informoj pri skolta movado (ankaŭ en nederlanda kaj germana lingvoj). Sendu al s-ino Dupont *.

* S-ino Bernadette Monti *, respondeculo de loka E-grupo serĉas familion kiu povus gastigi dum 1-2 semajnoj siajn du filinojn (12- kaj 14-jaraj) por plibonigi konon de la nederlanda lingvo. Interŝanĝo eblas.
Eble iu pretas "strukturigi" tiajn interŝanĝojn?

**Fleja-membrokunveno - 8 maj 1994 (sc)**
Ĉeestas: Stefaan Cottenier, Ilja De Coster, Bart Demeyere, Jorg De Mulder, Wim Slootmans, Eddy Van den Bosch

**1. Raporto pri la administrarkunveno de FEL (Wim)**
La 7an de majo Wim ĉeestis la admini-

strantarkunvenon de FEL kiu traktis ties estontan internan organizon. Unue oni klarigis la oficialan strukturon de ASPC (Asocio Sen Profitdona Celo). Decidoj en ASPC okazas je tri niveloj:

a) La ĝenerala membrokunveno
Ĝi okazas ĉiujare kaj ĝin konsistigas ĉiuj membroj. Ĝi elektas la ĉi-subajn decidnivelojn b) kaj c)

b) La administrantaro (Raad van Beheer)
Tiu ĉi decidas pri la grandaj linioj aŭ la ĝenerala politiko en la decidoj. Laŭleĝe ĝi devas kunveni almenaŭ unufoje jare. Ĉe FEL la administrantaro je tiu kunveno kutime transdonas ĉiujn siajn funkciojn al la decidnivelo c). Ĉe Fleja la administrantaro laŭ silenta interkonsento aŭtomate egalas al decidnivelo c).

c) La estraro (=Raad van Bestuur)
Ĝi decidas pri ĉiutagaj aferoj kaj kunvenas pli ofte.

FEL decidis pli uzi la eblecojn de administrantaro por senŝarĝigi la estraron. Krome, ĉiu el la ses estraranoj respondecos pri komisiono kiu konsistos el tiu estrarano, administranto kaj 1 ĝis 3 aliaj membroj. Oni esperas tiel atingi pli da homoj kiuj ne ŝatas agadi je ĉiuj kampoj, sed jes je unu specifa. Kaj samtempe tio helpas al la troŝarĝita estraro. Al tiuj Fleja-anoj rajtas aliĝi al la komisionoj, kandidatiĝu ĉe la respondeculoj (vi trovos ilin en la raporto de tiu kunsido, aliloke en ĉi vertikale).
Ankaŭ Fleja ŝatus pli dividi la taskojn, i.a. por eviti ke dum la estrarkunsidoj estas parolata nur pri la semajnfino. Komisiono pri semajnfino certe indas. Ilja kaj Lode el Kalmthout kaj verŝajne ankaŭ Els volas okupiĝi pri tio.

**2. Elekto de nova estraro**
Wim jam de kelka tempo kandidatis por la posteno de kasisto, kiun Eddy volas transdoni. Stefaan klarigas ke li antaŭ du jaroj elektiĝis kiel prezidanto pro manko de alia kandidato, sed ke li neniel sentis sin bona en la rolo de kunordiganto. Li preferas pli konkretan taskon, kaj kandidatas kiel sekretario (laboro kiun Yves Nevelsteen pro daŭra malsano ne plu povas daŭrigi). Jorg kandidatas por prezidanto. Ilja kaj Bart kandidatas por estrarano. Ĉar ne estas protestoj la kunveno akceptas la ĉi-supre priskribitan estraron. La posteno de vic-prezidanto - kiu ĉe ni estas nenio alia ol tiu de estrarano (escepte okaze de morto de Jorg-...) - estas atribuita al Bart.
Ĉar ŝanĝiĝas la kasisto, ni devas anonci la novan estraron en la belga ŝtatgazeto. Se ne, Wim ne povas fari financajn agojn nome de Fleja. Li demandos ĉe FEL kion ni faru por publikigi.

**3. Divido de pliaj en- kaj ekster-estraraj taskoj**
Ilja kiel estrarano okupighos pri informado al la malesperanta mondo. Li i.a. faros liston de borsoj aŭ kunvenoj kie ni reprezentiĝu kun informa materialo. Stefaan rimarkas ke ekzistas fotokopia revuo (INTERECO) kiu anoncas multajn esperantistajn kaj ĉi-rilatajn okazaĵojn. Nun Yves ricevadas ĝin. Stefaan sendos la kontaktadreson al Ilja por ke li povu ŝanĝi la sendadreson.
Apud la estraro estos la komisiono pri renkontiĝoj. Ĝi unue listigos la taŭgajn ejojn (pri kiuj ni jam havas liston kiu nun estas ĉe Yves Nevelsteen. Eddy havas pasintjaran ekzempleron en sia aŭto kaj tuj donos ĝin al Ilja).
Jorg emas okupiĝi ankaŭ pri instruado. Li pensumas pri instruado rekte fare de Fleja, ĉar la transigo de junuloj de klubaj kursoj al ni ne bone funkcias. Wim rimarkas ke tio estas granda tasko, kaj ke eble pli taŭgus kontakti la klubajn instruistojn por instigi ilin al la Fleja-propagando. Eble pli realigebla afero en la baldaŭa estonto estas daŭriga kurso dum la aŭtuno por IS-emuloj.
La eksterajn rilatojn al la esperanta mondo prizorgos Jorg. Li ankaŭ estos TEJO-komitatano.
Stefaan transprenos la redaktadon de JEN, ĝis kiam Yves denove sanos. Kompare al lia redaktado de antaŭ du jaroj, la situacio ŝanĝiĝis: tiam la flandra redaktanto nur sendis srtikolojn, la du nederlandaj redaktantoj faris la finan laboron. Nun Yves kaj la nura nederlanda redaktanto Sjoerd Bosga kunvenis persone por duope fari la laboron. Stefaan ne vidas tempon por fari tion, sed esploros ĉu al Sjoerd eblas dividi la taskojn helpe de retpoŝta kunlaboro.

**4. Financoj**
Eddy donis al Wim superrigardon pri la nuna stato de ĉiuj kontoj. Wim translokos la kontojn al bankoj en sia najbareco. Depende de la banko ŝanĝiĝos la kontnumeron. Ĉar ni nuntempe ne plu havas stokon da Fleja-leterpapero (kiu mencias la kontnumeron) tio ne vere gravas. En unu okazo estas eĉ pli favore fermi la konton en unu filio kaj en alia bankoficejo denove malfermi ĝin.
Financan raporton pri 1993 Eddy ne finpretigis. Li jes jam povas diri ke estis pli da elspezoj ol kutime pro la presado de nia broŝuro. La semajnfino en Kortrijk havis preskaŭ nul-rezulton.
Wim rimarkigis al FEL ke Fleja ne profitas de la altigo de l' kotizoj. Ili altiĝis per 200 fr., el kiuj 100 fluas al FEL kaj 100 al la loka klubo. Sed ofte junuloj tute ne rilatas al la loka klubo, sed nur al Fleja. Ĉu oni malatentis pri ni? Wim ne ricevis veran respondon, kaj insistos.

**5. Raporto pri OKEJ (Jorg)**
Antaŭ unu monato okazis Okcident-Eŭropa Junulara Konferenco en Antverpeno. Protokolon plupreparas Thomas Pusch. Priparolata temo estas i.a. la tiel nomata Praga kurso. Dumsomere okazos en Prago E-kursoj por komencantoj (ĝis 15 personoj de unu lingvo) kaj progresantoj. Jam 10 nederlandaj komencantoj interesiĝas, indas ankoraŭ varbi kelkajn flandrojn ĝis la limdato (1/7). Tiucele Jorg disdonas varbilojn al la ĉeestantoj por ke ili dispendigu ilin ĉiuloke.

**6. Service Civil International**
La organizo SCI organizas ĉiujare diversajn laborkunvenojn (purigado de tereno, restaŭrado de konstruaĵo,...) por kunlaborigi diversnaciajn homojn. Dum unu el tiuj kunvenoj, du Francoj ĉiujare instruas duontage Eon. Post tiu ĉi jaro ili ĉesos fari tion kaj ili invitas instruemajn esperantistojn partopreni la ĉi-aŭgustan aranĝon por ekkoni la principon. Estus tre bone se ni trovus du instruistojn kiuj volas aŭ taŭgas. Ilja publikigos tiun ĉi anoncon (GEJ-gazeto, koncize).

**7. Feria borso en Tessenderlo**
Je la unua de majo okazis ĝi. Wim iom antaŭe sendis kelkajn ekzemplerojn de nia broŝuro, TEJO-informilojn, varbilojn pri la praga kurso, ion pri la labortendaro de TEJO.

**8. Fleja-semajnfino en Melle**
Kvankam la semajnfino estis pli frue organizita ol pasintjare, oni ne povas nomi ĝin profesia (sed ni amuziĝis). Estas planoj por eble organizi la paskan renkontiĝon de NEJ kune kun ili en Flandrio. Tiuokaze ĉio devos funkcii ankoraŭ pli flue (kio cetere pli bone eblos, ĉar tie ĉeestas 5-oble pli da homoj). Ĉeestis en Melle 15 homoj inter kiuj 6 Nederlandanoj kaj du pli malpli novaj Flandroj. La lingva nivelo estis tre bona (preskaŭ neniom da krokodilado).
Du homoj kiuj ne aliĝis sed simple serĉis la ejon laŭ la nomo de la komunumo

Melle ne sukcesi trovi ĝin ĉar la ejo troviĝas en Melle-Gontrode. Jorg skribos pardonpetan leteron al ili (kvankam ne ni kulpas, nealiĝinte ili ne disponis pri dua informilo).
La financa profito de la semajnfino estis tiel neatendite granda, ke ni eĉ kapablis doni vojaĝsubvencion al la eksterlandanoj.

**9. Subtegmento**
La subtegmento en la E-domo en Antverpeno estas enordigita. (Dankon al la farintoj!) Venontfoje ni priparolos kiel uzi ĝin.

**10. Venonta kunveno**
La venonta estrarkunsido estos je mardo la 28-a de junio, je la 20-a horo en Antverpeno.

**Administrantarkunsido de FEL en Gent - 7 maj 1994 (il)**
Ĉeestis: Wim De Smet (WDS), Roland Rotsaert (RR), Jacques Schram (JS), Paul Peeraerts (PP), Ingrid Lievens (IL), Henny De Ketelaere, Lucien De Sutter, Mari-Roza De Wolf, Jef Geeraerts, Piet Glorieux, Roger Goris, Ghislains Jacobs, Katja Lödör, Wim Slootman, Edward Symoens, Cor Van Ekelenburg, Jules Verstraeten

komenco 10h; fino 12h40

**0. Vizito de s-ino Marjorie Boulton**
Post akcepto kaj salutoj, s-ino Boulton prezentis al ni tri novajn poemojn siajn.

**1. Alparolo de la nova prezidanto Wim De Smet**
WDS prezentas sin kaj skizas la evoluon de la E-movado en Flandrujo. Li opinias ke FEL devas ŝanĝi kelkajn metodojn kaj agadmanierojn. Dum sia eksterlanda restado li aprecis la valoron de bone preparitaj dokumentoj.

**2. Rolo de la administrantoj**
La administrantoj havas respondecon. Ili estu elektitaj kaj laboru laŭ la statutoj. La estraro de FEL devas informi kaj konsulti la administrantojn. La administrantoj esprimu la ideojn de la lokaj grupoj. Anstataŭantoj ne estas antaŭviditaj, do la elektitoj mem ĉeestu la kunsidojn.

**3. Konsistigo de komisionoj**
WDS verkis proponon pri regularo. La estraranoj priparolos tiun tekston dum la venonta estrarkunveno. La komisionoj pridiskutu la ideojn, la problemojn, sed la komissiito efektivigas la laboron. Oni ĉiam povas inviti specialiston. Jenaj administrantoj kandidatiĝas (aliaj personoj havas ankoraŭ eblecon anonci sin):

Financoj (RR): PP, WDS, oni serĉas kompetentulon!
Instruado, aktivuloj (JVE): Edward Symoens, Henny De Ketelaere, Cor Van Ekelenburg
Membroj, grupoj, revuoj (IL): Katja Lödör, Ghislain Jacobs, Lucien De Sutter, Mari-Roza De Wolf
La domo (JS): Ivo Durwael, PP, Jules Verstraeten, Cor Van Ekelenburg
Informado (WDS): Germain Pirlot, Piet Glorieux
Ekster-FEL-aĵoj (AH): PP, RR, WDS

**4. Eŭropaj elektoj**
WDS skribis al la partioj por ke ili indiku kandidaton kiu deklaras sin favora al Eo. La rezulton ni sciigos al la membroj, tiel oni povas subteni tiun kandidaton. Ĉu iu persone konas kandidaton? Jam venis respondo de Willy De Clerq.

**5. Problemoj de kelkaj grupoj**
M. Habex kaj J. Geeraerts estis invititaj por priparoli la problemon en Limburgo.



M. Habex ne reagis, eĉ post 2a letero. J. Geeraerts ĉeestis la kunvenon kaj klarigas la problemon. La estraro denove skribos al M. Habex kaj decidos pri la afero dum la venonta estrarkunveno.

**6. Anstataŭigo de komitatano ĉe UEA**
AH devus partopreni la komitatkunsidojn de UEA, sed li ne iros al Seulo. Edward Symoens provizore volas anstataŭi lin.

**7. Diversaĵoj**
Pro manko de tempo sekvis nur kelkaj anoncoj; la aliaj punktoj estos pritraktataj dum la venonta kunveno.

**Adresaro**
Antoine Dumortier, Av. du Laerbeek 27, 1090 Brussel, (02) 478.14.67

s-ino Dupont, rue de Henne 16, 4058 Embourg

Bernadette Monti, rue Sompré 34, 4400 Ivoz-Ramet [Flémalle, regiono Liège]

Fernand Roose, Sinte Klaradreef 59, 8000 Brugge

**Organigramo**

**HONORA KOMITATO**
+ Emile Cortvriendt, Diepestraat 29, 2060 Antwerpen.
Tel. (03) 232 44 30.
+ Gérard Debrouwere, Magdalenastraat 29, 8500 Kortrijk.
Tel. (056) 22 76 48.
Fernand Roose, Sinte-Klaradreef 59, 8000 Brugge.
Tel. (050) 34 30 61.
Edward Symoens, Putsesteenweg 151, 2920 Kalmthout.
Tel. (03) 666 62 66.
+ Cesar Vanbiervliet, Oudenaardsesteenweg 158, 8500 Kortrijk.
Tel. (056) 22 00 11.
Jules Verstraeten, Sint-Bernardsesteenweg 1078, 2660 Hoboken.
Tel. (03) 827 66 43.

**ESTRARO**
Prezidanto:
Wim De Smet, Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel. (03) 666 99 49
Vicprezidanto:
Alex Humet, Van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem
Tel. (03) 239 21 69
Sekretario:
Johan Van Eeno, Peperstraat 72, 8000 Brugge
Tel. (050) 34 71 92
Financoj:
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge.
Tel. (050) 33 00 04
Membroj:
Ingrid Lievens, Oudebareelstraat 10, 9041 Oostakker
Jacques Schram, Hof Ter Bekestraat 49, 2018 Antwerpen
Tel. (03) 237 86 02

**GRUPOJ - ADMINISTRANTOJ**

**ANTVERPENO**

**La Verda Stelo**

Korespondadreso:
"La Verda Stelo", Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

Prezidanto:
Jacques Schram, Hof Ter Bekestraat 49, 2018 Antwerpen
Tel. (03) 237 86 02



Vicprezidanto:
Henny De Ketelaere, Miroeusstraat 26, 2018 Antwerpen
Tel. (03) 237 15 67
Kasisto:
Clara Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem
Tel. (03) 440 30 92
Membro:
Cor Van Ekelenburg, Korte Van Sterbeeckstraat 7, 2060 Antwerpen

**La Erikejo**

Korespondadreso:
"La Erikejo", Douglaslaan 14, 2950 Kapellen

Prezidanto:
Jorg De Mulder, Beauvoislaan 86, 2920 Kalmthout
Tel. (03) 666 95 98
Vicprezidanto:
Wim De Smet, Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel. (03) 666 99 49
Sekretario:
Mireille Storms, Douglaslaan 14, 2950 Kapellen
Tel. (03) 666 83 19
Kasisto:
Erhard Boehme, Plantinlaan 10, 2940 Stabroek
Tel. 664 40 47

**BRABANT**

**Esperanto 2000**

Korespondadreso:
"Esperanto 2000", Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille

Prezidanto:
Bert Vanhoven, Boerenkrijglaan 20, 3120 Tremelo
Tel. (016) 53 58 92
Sekretario:
Roger Goris, Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille
Tel. (010) 86 01 12
Kasisto:
André Wollants, Maleisenstraat 86, 3020 Herent
Tel. (016) 23 74 18
Administrantoj de FEL:
Ghislain Jacobs, Kerkstraat 97, 3010 Kessel-Lo

Tel. (016) 26 16 93
Roger Goris, Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille
Tel. (010) 86 01 12

## LIMBURG

### Limburga Esperanto-Ligo

Prezidanto:
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen.
Tel. (011) 52 19 43.
Sekretario:
Albert Claesen, Zonnebloemstraat 13, 3590 Diepenbeek.
Tel. (011) 32 36 03.
Kasisto:
Albert Claesen.
Administranto de FEL:
Jef Geeraerts, Boendersstraat 12, 3670 Meeuwen
Tel. (089) 41 80 95

### Beringen

Prezidanto:
Jos Lemmens, Maasheidestraat 7, 3580 Beringen.
Tel. (011) 42 26 36.
Sekretario:
Gustaaf Rombaut, Zandhoefstraat 156, 3583 Beringen-Paal.
Tel. (011) 42 80 20.
Kasisto:
Gustaaf Rombaut.

### Genk

Vicprezidanto:
Hendrika Mandervelt, Gildelaan 27, 3600 Genk.
Tel. (089) 35 95 42.
Sekretario:
Willy Minnen, Loskaaistraat 6, 3600 Genk.
Tel. (089) 35 07 13.
Kasisto:
Willy Minnen.

### Hasselt

Prezidanto:
Peter Berx, Havermarkt 39 bus 7, 3500 Hasselt



Tel. (011) 23 30 93
Sekretario:
Marcel Aerts, Lazarijstraat 122, 3500 Hasselt
Tel. (011) 32 36 03
Kasisto:
Albert Claesen, Zonnebloemstraat 13, 3590 Diepenbeek
Tel. (011) 32 36 03

### Houthalen

Prezidanto:
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen
Tel. (011) 52 19 43
Vicprezidanto:
Leon Geysmans, Lariksenstraat 13, 3530 Houthalen
Tel. (089) 38 17 77
Sekretario:
Alfons Lijnen, Grote Baan 156, 3530 Houthalen
Tel. (011) 52 20 74
Kasisto: Alfons Lijnen

### Peer

Liliane Verpoorten, Burkel 16 B/2, 3990 Peer
Tel. (011) 63.64.34

## OKCIDENT-FLANDRUJO

### Paco kaj Justeco

**Prezidanto:**
André Dumarey, Blekerijstraat 32, 8310 Brugge-Assebroek.
Tel. (050) 35 48 13.
Sekretario:
Oliva Van Eeghem, Torhoutsteenweg 31, 8200 Sint-Andries
Kasisto:
Raymond Defrancq, Rietlaan 57, 8200 Brugge-St-Michiels.
Tel. (050) 38 11 98.
Administranto de FEL:
Johan Van Eeno, Peperstraat 72, 8000 Brugge
Tel. (050) 34 71 92

### La Konkordo

Prezidanto:
Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk

Tel. (056) 20 07 96
Sekretario:
Piet Glorieux Werkensstraat 56, 8600 Werken
Tel. (051) 56 90 30
Kasisto:
Danielle Sabbe-Demeyere, Winterland 23, 8501 Heule
Tel. (056) 35 55 35
Administrantoj de FEL:
Piet Glorieux

**La Konko**

Korespondadreso:
"La Konko", Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende

Prezidanto:
Raymond Wylleman, A.Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende
Tel. (059) 50 27 08
Vicprezidanto:
Flory Witdoekt, Witte-Nonnenstraat 9A, 8400 Oostende
Tel. (059) 70 29 14
Sekretario:
Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende
Tel. (059) 80 85 17
Kasisto:
André D'Hulster, Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende
Tel. (059) 80 06 95
Administranto de FEL:
Lucien De Sutter, Frère Orbanstraat 210, 8400 Oostende
Tel. (056) 50 18 25

**Knokke**

Prezidanto:
Albert Marmenout, Helmweg 7, 8300 Knokke-Heist 1
Tel. (050) 60 55 35

**ORIENT-FLANDRUJO**

**La Pioniro**

Prezidanto:
Mari-Roza De Wolf, Botermelkstraat 100. 9300 Aalst.
Tel. (053) 78 26 04.
Sekretario:



Hugo Dossche, Asserendries 103, 9300 Aalst.
Tel. (053) 70 17 89.
Kasisto:
Clement Amant, Brakelstraat 52, 9300 Aalst.
Tel. (053) 21 31 56.
Administranto de FEL:
Mari-Roza De Wolf

**La Progreso**

Prezidanto:
Katja Lödör, Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge
Tel. (09) 230 16 77
Vicprezidanto:
Patrick Haerick, Zilverberklaan 25, 9032 Wondelgem
Tel. (09) 227 02 15
Sekretario:
Ingrid Lievens, Oude Bareelstraat 10, 9041 Oostakker
Kasisto:
Hans Delnat, J. Lambrechtstraat 8, 9000 Gent
Tel. (09) 221 10 02
Administrantoj de FEL:
Katja Lödör

**KOOPTITAJ ADMINISTRANTOJ**

Wim De Smet, Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel. (03) 666 99 49
Alex Humet, Van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem
Tel. (03) 239 21 69
Piet Glorieux, Werkensstraat 56, 8600 Werken
Tel. (051) 56 90 30
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge
Tel. (050) 33 00 04.
Ingrid Lievens, Oude Bareelstraat 10, 9041 Oostakker

**ADMINISTRANTOJ-FUNKCIULOJ**

Paul Peeraerts, Baron Dhanislaan 13, 2000 Antwerpen
Tel. (03) 234 34 00 (dum oficejaj horoj)
Guido Van Damme, Haantjeslei 31, 2018 Antwerpen
Tel. (03) 234 34 00 (dum oficejaj horoj)

**FLEJA**

Korespondadreso:
Fleja, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

Prezidanto:
Jorg De Mulder, Marnixplaats 10, 2000 Antwerpen
Tel. (nur semajnfine) (03) 666 95 98
Vicprezidanto:
Bart Demeyere, Drift 26, 8420 Wenduine
Tel. (dum oficlioroj) (03) 240 88 61
Sekretario:
Stefaan Cottenier, Veldstraat 49, 3001 Heverlee
Tel. (016) 20 77 38
Kasisto:
Wim Slootmans, J. Moretuslei 74A (G), 2610 Wilrijk
Tel. (03) 820 24 54
Estrano:
Ilja De Coster, Varendriekouter 47, 9031 Drongen
Tel. (09) 227 86 64

FEL-administranto:
Wim Slootmans
TEJO-komitatano:
Jorg De Mulder

## KUNLABORANTAJ ASOCIOJ

**Belga Esperantista Fervojista Asocio**
Lucien De Sutter, Frère-Orbanstraat 210, 8400 Oostende
Tel. (059) 50 18 25

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**
Raymond Wylleman, A. Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende
Tel. (059) 50 27 08

**Belga Ligo de Katolikaj Esperantistoj**
Hubert Audenaert, Beekstraat 6, 9160 Lokeren
Tel. (09) 348 44 56.

**Skolta Esperanto-Ligo - Belgio**
Prezidanto:
Arie Bouman, Driesdreef 8, 9030 Mariakerke
Tel. (09) 227 48 41
Sekretario:
Nico Boon, Merelhof 8, 3300 Tienen
Tel. (016) 81 52 46